



Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN

Simpla : 7 fkoj / 13, boulevard de la Chauvinière
Bonfara : 12 fkoj / 44 - Nantes

P.Č.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1966

5

KULTURAJ KAJEROJ

1966

Septembro - Oktobro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatancoj :

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

Pri la Kulturdomo

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

Turismo :

Kelkaj notoj pri Libano

El prelego :

Kio estas alergio ?

P. Chevalier

Pri pontoj :

Waterloo Ponto

J.C. Fowler

Poeziaĵo :

La sango elverŝita

F. Garcia Lorca
(Tr. A. de Orriols)

La lando de reĝino Maud (3)

Zorja Danovskaja

Gravaj datrevenoj

Fantaziaĵoj :

Bretona fantaziaĵo

R. Martin

Por via distro :

Nia nova Konkurso
Amuzaj problemoj

P. Chevalier
B. Jarlier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭdiitaĵojn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « Kulturaj Kajeroj » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

PRI LA KULTURDOMO

Kio okazis en Gresillon dum la somero ? Tiun demandon faras al si la gesamideanoj, kiuj ne havis la okazon viziti la kastelon ĉijare. Ĉar ankaŭ la administrantaro faras al si tiun demandon kiel kutime en oktobro, jen la respondo.

La diversaj eroj de la programo okazis laŭ la antaŭvidita plano. La unua periodo estis dediĉita al kursoj gvidataj de S-ino Major, kiu tiel kompetente kaj vigle instruas la praktikan lingvon ; F-ino J. Vazon kaj poste D-ro Boulogne kiuj zorgis pri la komencantoj kun granda sindonemo ; S-ro Ribot, kiu gvidis la superan kurson kun la kutima sukceso. Bedaŭrinde la nombro de la kursanoj ne estis tiom granda, kiom lastan jaron.

La prelegoj prezentitaj dum la dua periodo multe plaĉis. D-ro A. Bormann, D-ro W. Bormann, S-ro Chevalier, S-ro Frangeul, S-ro J.-P. Guillot parolis pri siaj plej ŝatataj temoj : Eŭropo, lingvistiko, alergie, turismo, Scienco en la moderna vivo. La diverseco de la temoj, la kompetenteco de la prelegantoj pravigas la sukceson ricevitajn de la diversaj prelegoj. La programo de la ekskursoj, iom ĝenataj de la vetero, tamen plaĉis kaj eĉ gesamideanoj, kiuj jam vidis kelkajn el la kasteloj, kies vizito estis proponita, partoprenis la ekskursojn kun granda plezuro.

La tria periodo, kvankam la nombro da ĉeestantoj ne estis tiel granda, kiel lastan jaron ĉar la Universala Kongreso ne okazis en tiom malproksima lando, venigis nombron da jam konataj gesamideanoj, kaj nekonatulojn, kiuj tuj fariĝis niaj amikoj. La grupo de gejunuloj estis simpatia kaj ĉiuj memoros pri Maria Draŝnarova el Praha kies afableco kaj rideto radiis en la tuta kastelo. Oni multe laboris en Esperanto. Oni ankaŭ multe laboris posttagmeze en la laborejoj ; oni atente aŭskultis la konsilojn de S-ro Bourdelon kaj tre

bele bindis librojn ; oni faris multajn korbojn kaj aliajn tre elegantajn rotango-objektojn sub la gvidado de S-ino Benazet. Fakte oni lernis multon.

Pro malhelpo okazinta al S-ro Martin, S-ro Ribot afable kaj sindoneme konsentis gvidi la kursojn de la lasta periodo. Lia tasko ne estis tre facila ĉar la lingvo-nivelo de la kursanoj estis iom malsimila. Sed li sukcese interesis ĉiujn kaj tio estas lia granda merito.

Kaj nun ni devas jam pensi pri la venonta somero. Kelkaj novaj eroj estos verŝajne enkondukitaj en la programon. Eble okazos seminario organizita de grava internacia fako. Sed pri tio ni parolos pli poste. La ĝenerala programo estos verŝajne preta en novembro. Tiam vi povos peti informojn.

NIA RESTADO EN GRESILLON

Estas la dua fojo, ke Lisbeta kaj mi venas en Grésillon. Grésillon estas tiel bela kiel la alian jaron. La kastelo, la lago, la ĝardeno kaj la parko estas tre agrablaj por ni. Kiom da plezuroj estas en Grésillon ! Oni povas fari multon. Tiu restado estas ankoraŭ pli interesa ol tiu de 1965, kial ? ĉar la vetero estas pli bela, oni povas sekvi la kurson de sinjoro Ribot kaj sin bani. En Grésillon oni ankaŭ tre tre bone manĝas. Nun ni devas multe danki sinjorinon Vincent pro ŝia granda afableco kun ni.

Ankoraŭ multajn dankojn kaj

Vivu Grésillon !

SCHREIBER Lisbeta, 10 jara knabino.

PANNIER Véronika, 11-jara knabino.

Esperanto tra la Mondo



ESPERANTISTA SOMERA VIVO

Budaĉesto. — 51-a Universala Kongreso de Esperanto kun pli ol 4 000 partoprenantoj el 42 landoj. La alta protektanto de la kongreso, S-ro Kishazi, vic-prezidanto de la hungara respubliko, mem ĉeestis la inaŭguron.

Okazis ĝeneralaj kaj fakaj Kunvenoj, arta festivalo somera universitato, belartaj konkursoj, infana kongreso, ekskursoj. La ĉefaj laboraj temoj rilatis al la rezultoj de la Jaro de Internacia Kunlaboro, la instruado de Esperanto en lernejoj, kaj la plintensigo de agado en fakaj medioj.

La estraro de U.E.A. decidis, krom la altigo de la kotizoj, la reorganizon de la konsulta komisiono pri lernejoj, la ĉesigon de la apero de « Monda Kulturo » kaj la eldonadon de « Gepatra Bulteno ».

En Tel Aviv (2-9 de aŭgusto 1967) la laborsekcioj estos : « Esperanto en fakoj kaj profesioj », « lerneja kaj eksterlerneja instruado de la internacia lingvo », « Esperanto por Turismo ».

Swanwick. — Partoprenis 310 membroj de SAT, el 14 landoj. Okazis la kutimaj laborkunsidoj, prelegoj, Forumo (kiu pritraktis la Humanistan movadon en diversaj landoj), ekskursoj. La partoprenantoj estis akceptitaj de la urbestroj de Nottingham kaj Stoke on Trent. La venonta SAT Kongreso okazos en Malmö (Svedio).

Pecs. — Proksimume 1 000 gejunuloj el 24 landoj. « Neŭtraleco » estis la temo, kiun oni speciale diskutis. Aliĝis al TEJO Argentino, kaj Novzelando.

Graz. — 144 edukistoj kun 60 lernantoj ĉeestis la pedagogian seminaron.

Gresillon. — Pli ol 400 gesamideanoj vizitis la Kulturdomon el kiuj eksterlandanoj el 14 landoj. Raporto aperas aliloke en tiu ĉi numero.

NOVAĴOJ EL...

Hindio. — La hinda duon-kontinento pli kaj pli interesiĝas pri Esperanto. En decembro 1966 okazos la unua Tutlanda Kongreso. Libro aperis aŭ baldaŭ aperos. Ekspozicio estis prezentita en Santiniketan. Alia estos baldaŭ prezentita en New Delhi. Sed la Hinda Esperanto-Instituto bezonas materialan helpon. Adreso : S-ro Seoti Prakash, 13-15/10 Ramesh Nagar, New Delhi 15.

Ĉinio. — Fremdlingva Eldonejo, Pekino, aperigis trian ilustritan kajeron en Esperanto pri la milito en Vjetnamio.

Radio-Pekino daŭre elsendas vendrede kaj sabate vespere en Esperanto per pluraj mallongondaj stacioj.

Eldonaĵoj. — En la serio « Oriento-Okcidento » ĵus aperis numeroj 5 kaj 7 nome « Martin Fierro » (argentina gaŭĉa epopeo de José Hernandez) kaj « Kvin virinoj de amo » de Ihara Saikaku, japana verkisto.

La jubilea libro de Kalocsay kaj Baghy : « Ora duopo » estis laŭdire jam elvendita dum la kongreso.

Aperis (Scienca Revuo) « La briŝfotitoj el la bieno

Gresillon » de Feodor Jelenc profesoro pri natursciencoj. Okaze de multaj restadoj li havis la okazon bone koni tiun aspekton de la Gresillon-a mondo.

U.E.A. eldonis « La Esperanto-Societo », kun konsilioj por ĉiuj grupaktivuloj. Prezo : 1,50 gld. (6 st.).

Ĵus aperis « Fervoja Terminareto », Germana-Esperanta, Esperanta-Germana. Adreso : E. Ritterspach, Berliner Allee 1,D-607 Langen, Germanio.

Dua numero de I.O.E.-gazeto, organo de Instituto por Oficialigo de Esperanto, aperis. Redaktoro : A. Sekelj, Kondila 24, Beograd, Jugoslavio.

Estis eldonita en Nederlando disketo kun du muzikaj komponaĵoj kun esperantaj titoloj : « Esperanto marŝo » kaj « Sub la verda standardo », luditaj de la Reĝa Nederlanda Milita Orkestro.

Propono al Unuiĝintaj Nacioj. — Ĝin fine subskribis 912 463 individuaj personoj kaj 3 832 organizaĵoj kun 70 329 000 membroj.

Esperanto, ponto-lingvo. — En Praha aperis du malnovaj islandaj sageoj, tradukitaj de la islanda lingvo al la esperanta de B. Ragnarsson kaj de la esperanta al la ĉeĥa de O. Knichal.

En Japanujo ĵus aperis la vjetnama romano « Franjo Tu Haŭ » tradukita el la esperanta eldono.

Plej aĉetataj libroj. — La « Dia Komedio » de Dante kaj « Hamleto » de Shakespeare estis la plej aĉetataj fikciaj verkoj en Esperanto dum la jaro 1965.

Grava ekspozicio. — Ĝis la 29-a de oktobro ekspozicio pri Esperanto estas prezentata en la Franca Nacia Pedagogia Instituto sub patronado de la Ministro pri Nacia Edukado, de la Rektoro de la Pariza Akademio kaj de aliaj eminentuloj.

Junaj francoj, kiuj dezirus gastigi junajn ĉeĥojn kaj esti gastigitaj de ili poste, bonvolu skribi al : Dominique Babin, 13, Bd de la Chauvinière, 44 - Nantes.

Francan famekonatan brandon KONJAKO disvendas s-ano DESPEYROUX, reprezentanto, 200, rue du Faubourg St-Denis, Paris-10^e. Altkvalito garantiata. Ekspedo ekde la produktejo en ĉiujn pagipovajn landojn. Informpetu !

Turismo

KELKAJ NOTOJ PRI LIBANO

En Libano, dum la somero, la vizitanto povas iri jen al la marbordo, kie kreskas tropika vegetalaro, jen en la montaro sur kiu, laŭ la altitudo, kreskas variaj vegetaĵoj, la olivarbo kaj la biblia cedro. Sur la marbordo sin kaŝas multaj malgrandaj banlokoj, kie, sub la malvarmetigaj pinoj, troviĝas vilaoj kaj hoteloj superstarantaj la blinde lazuran maron.

Kion turisto devas nepre viziti en Libano?

Baalbeck. — La kolosaj ruinaĵoj de romiaj temploj dediĉitaj al la suno, kun la famekonata Internacia Festivalo de Danco, Teatro kaj Muziko, altiras vizitantojn el la tuta mondo.

La Cedroj. — Tie revis Lamartine, Nerval, Renan, Barres. Hodiaŭ ski-ĉampionoj fulme glitas inter la arboj jam ekzistantaj antaŭ Kristo.

Tripoli. — Mezepokaj mirindaj moskeoj staras apud la kastelo de la grafoj de Tuluzo. La urbo rapide grandiĝas.



Beit-Eddine. — Vera sonĝo de la « Mil unu noktoj », tie situas la palaco de la Emiro de Libano.

Byblos. — La plej antikva urbo en la mondo. Dum jam pli ol 6.000 jaroj, la civilizacioj lasis postsignojn en tiu mirinda loko inter la olivarboj, ĉe la marbordo.

Tyr. — Unu el la antikvaj metropoloj. Nia civilizacio dankas al ĝi sian ekziston. Nur hodiaŭ oni malkovras tiun fabelan pasintecon.

Jeita. — Unu el la tri plej belaj grotoj en la mondo, apud Nahr El Kelb (rivero de la hundo), kie konkerantoj el la tuta mondo, Ramses III-a, Aleksandro, Allenby, Lawrence, k.a. postlasis steleojn skulptitajn sur la klifo super la rivero kaj la maro.

Beyrouth. — Urbo de « Mil unu noktoj » necesa ligopunkto inter Oriento kaj Okcidento, fama pro sia Acapulco Strando.

El prelego prezentita en Grésillon

KIO ESTAS ALERGIO ?

De kelkaj jaroj, la vorto « alergia » fariĝis pli kaj pli ofte uzata. Alergio fariĝis laŭmoda malsano, kaj oni rilatigas ĝin al io ajn, de pentraĵo al... « je je » kantoj. Tamen en sia komuna formo, kiel en sia propra kaj vere medicina signifo, la vorto « alergia » konservis neŝanĝitan karakteron, la ideon de reago fortega kontraŭ io.

Kion do signifas tiu vorto ? Se ni rememoras la etimologion, la devenon de la vorto, ni konstatas, ke ĝi devenas de grekaj vortoj, kies signifo estas : « ago alia », alia, ol tiu, kiun oni normale povas atendi.

Klinikaj manifestacioj de alergia, same kiel astmo, « fojna » nazkataro, jukinflamo, ekzemo, k.a. estis konataj jam antaŭ longa tempo, sed ties mekanismo ĝis la komenco de ĉi tiu jarcento restis tute nekonata.

Du Britoj, Salter kaj Blackley, estis la pioniroj. Salter suferis pro astmo, kiam li kontaktis sian katon. Li rimarkis, ke, fro-tante la felon de la besto sur sia haŭto, li kaŭzis erupcion. Siaflanke Blackley, kiu suferis pro fojna nazkataro, notis, ke poleno frotita sur lia haŭto kaŭzis viglan lokan reakcion. En 1902, Richet kaj Portier injekciis, subhaŭte, al hundo, unu kuban centimetron da ekstraktaĵo el palpoj de mara besto nomita « mara anemono ». La hundo neniel reagis... Tri semajnojn poste, la sama hundo denove ricevis saman injekcion, kaj mortis post 25 minutoj, montrante tiun fenomenon, kiun oni nomas nun « ŝoko » aŭ « kolizio ». La eksperimentistoj atendis kontraŭan rezulton, ĉar estis tiam la fama epoko de vakcina imuneco, sekve de la verkoj de Pasteur kaj ties disĉiploj. Pro tiu ne atendita rezulto, Richet kaj Portier kreis la vorton « anafilakso », formitan per du grekaj vortoj signifantaj : « kontraŭ » kaj « ŝir-

mado ». Anafilakso estas la kontraŭo de imuneco.

Oni tre rapide komprenis, ke anafilakso ne estas neordinara fakto, kaj ke tute ne venenigaj substancoj, same kiel ĉevalserumo, povis kaŭzi tiun anafilaksan kolizion. Kvar jarojn post la eksperimentoj de Richet kaj Portier, en 1906, von Pirquet konstatis, ke malsanulo pri tuberkulozo aŭ eksmalsanulo reagis kontraŭ tuberkulino (substanco eks-traktita el kulturaĵo de Koch-aj baciloj) tute ne same kiel malsanulo. Estis trovita la principo de kutireakcio (haŭtreakcio), kiu nun estas ĉiutage uzata, kiel diagnoza rime-do. Von Pirquet kreis la vorton alergia.

En 1911, amerikaj sciencistoj efektivigis la unuajn haŭtajn testojn, kiuj ebligis observi reakciojn kontraŭ diversaj substancoj : poleno, por uloj suferantaj pro fojna nazkataro, ĉeval-haŭtskvamoj por tiuj, kiuj suferas pro astmo kiam ili alproksimiĝas al ĉevaloj (tio estas sufiĉe ofta), ova blankaĵo por tiuj, kiuj suferas pro urtikario, kun kri-zoj aperantaj, kiam ili manĝis ovojn. Oni diris, ke tiaj homoj estas sentemegaj aŭ aler-giaj kontraŭ tiuj substancoj. Tiamaniere oni povis pensi pri alergiaj malsanoj.

Post tiu mallonga kaj certe ne kompleta historio de alergia, ni nun povas diri, ke alergia estas « alia reago », troega respon-do al kontakto de ekstera substanco, kiu ĉe normala (nealergia) homo, kaŭzas nenium perturban, nenium malnormalaĵon. Nun ni rapide studos la mekanismon de alergiaj okazaĵoj. Ni indikos la ĉefajn alergiigajn substancojn. De la difino mem de alergia venas kelkaj karakteroj :

neceso de antaŭa kontakto de orga-nismo kun alergiigo ;
alia reago, ĉar ĝi estas alia ol tiu kiu okazis je la unua kontakto ;

la reago estas specifa je la substanco ;

tiu substanco povas esti aŭ viva aŭ neviva.

Do, alergiaj fenomenoj estas tute aliaj ol venenaj fenomenoj. Plej ofte alergigaj substancoj estas senvenenaj substancoj. Alergio estas fenomeno specifa kaj individua, propra al iu persono. Se iaj urtikarioj estas kaŭzataj de ovoj aŭ fiŝaĵoj, se iaj nazkataroj estas kaŭzataj de plantaj polvoj, se iaj ekzemoj estas kaŭzataj de cemento, tinkturoj aŭ kosmetikoj, la pli multo el la homoj povas manĝi ovojn aŭ fiŝaĵon, spiri polenon aŭ tuŝi cementon, tinkturon aŭ harŝmiraĵon tute sendomaĝe. Do ne tiuj substancoj mem estas malutilaj. Personoj, la alergiuloj, posedas nenormalan sentokapblon. Por tion klarigi, oni opinias, ke okazas konflikto, batalo, inter antígeno kaj antikorpo. Vi scias, ke oni nomas « antígeno » substanceton kiu estigas antikorpojn, ekz. bakterioj, organaj ĉeloj, albuminoj. Antikorpo estas specifa aĵo formata en la organismo kontraŭ antígeno.

La antikorpoj estas specifaj je la korespondantaj antigenoj. Ili estas (eble... estas nur hipotezo) specialaj globulinoj formitaj de limfocitoj (kiuj estas la ĉefaj leŭkocitoj en la sango kaj limfo) kaj plasmoceloj. La unuiĝo de antígeno kun antikorpo kaŭzus liberigon de histamino, kiu respondecas pri klinikaj simptomoj. Kiam antikorpo estas fiksita nur sur histo (tekstaĵo) aŭ organo, temas pri teksaĵa aŭ hista alergia. Kiam antikorpoj rondiras en la sango temas pri humora alergia.

Alergia tereno do povas esti difinita dumaniere :

kapablo fabriki antikorpojn :
nekapablo neŭtrigi histaminon.

Sajnas tamen, ke histamino ne sufiĉas por klarigi ĉiujn alergiajn fenomenojn. Aliaj substancoj povas ankaŭ interhelpi : heparino, acetilkolino, k.a.

Flanke de tiu terena aŭ humora alergia estas alia formo en kiu oni ne povas trovi la antikorpojn en la sango. Oni supozas ilin fiksita sur histoj : temas pri hista alergia. Kelkfoje, ekzemple, la antikorpoj estas en la hauto, kaj oni povas videbligi ilin per kutireakcio, kiu konsistas el ekzemento ruĝa kaj veziketforma post 24 aŭ 48 horoj.

Do, resume, oni povas diri, ke la konsekvencoj de la konflikto antígeno-antikorpo estas tujaj en alergia humora kaj malfruaĵ en alergia hista.

Kiamaniere okazas tiu kolizio ? La ĉefaj simptomoj estas : ĝenerala erupcio (eritodermio) kun jukado (prurito). Ni nun povas vidi la manierojn por evidenti alergiajn. Oni komencas uzi haŭtajn testojn : polverojn, plumerojn, kiam temas pri spira alergia, ovoblankaĵo, lakto, fiŝo kiam temas pri digesta alergia. Oni uzas aŭ skarifikojn, aŭ stampojn similajn al tiuj uzitaj por tuberkuloz-diagnozo.

Estas certe, ke alergiaj malsanoj estas tre oftaj. Tamen oni ne devas uzi la vorton « Alergio » ĉiokaze, kiam oni ne klare ekkonas la kaŭzon de malsamo. Ni esperas, ke la aŭtaŭĝ linioj permesos al vi pli precizan ideon pri tiu grava afero : Alergio.

P. CHEVALIER.



**NE FORGESU
KE VI NUN DEVAS PAGI VIAN ABONON AL :**

P. Babin

13, boul. de la Chauvinière

44 - Nantes

Poŝtkonto : Nantes : 2.813.61

Pri Pontoj en Londono

Waterloo Ponto



Waterloo Ponto konstruiĝis dum la fruaj jaroj de la pasinta jarcento, kaj rekonstruiĝis lastatempe. Sed, ne kreu, ke oni konstruis la ponton, kiel monumenton dediĉitan al la batalo. Kelkajn jarojn antaŭ tiu batalo oni formis kompanion por konstrui ponton inter la Strand kaj Lambeth. Unue, oni devis batali kontraŭ la kontraŭstaroj de la instancoj de la Civito de Londono. Tiam estis disputo, ĉu la ponto estos el ligno aŭ el ŝtono. Fine, en la jaro 1811, oni solene metis la fundamentan ŝtonon. La konstruo de la ponto plenigis plurajn jarojn. Dumtempe, venis la « Centtagoj » de Napoleono, kiuj kondukis lin al renkonto kun Wellington ĉe Waterloo. Fine, oni prokrastis la malferman ceremonion de la ponto, por ke tiuj ritoj okazu e la unua datreveno de la batalo. Do, anstataŭ la originala nomo de Strand

ponto, oni preferis ke Waterloo Ponto estu ĝia nomo. Ĝi estis certe la plej bela el la pontoj de Londono. Ankaŭ, ho, ve, la preferita ponto de la sinmortigantoj. Strange, ĉu ne, ke eĉ sinmortigo estas afero de modo !

Iam la poeto Tom Hood ĉeestis kiam oni eligis el la rivero apud ĉi-tiu ponto la kadavron de junulino. Kiel poeto li ne kulpigis ŝin, kiel oni tro facile faris pro ŝia ribelo kontraŭ la leĝoj de Dio, kaj de la socio. Li vidis, ke la socio estas kulpa. Kaj li verkis poemon pri tiu ponto, kiun li nomis « la Ponto de ĝemoj ». Ĝi estas longa poemo, tamen mi kuraĝis imiti kelkajn strofojn por doni al tiuj, kiuj ne bone konas la anglan literaturon ideon pri ĝia stilo, kaj interno.

1. Unu denove jen
Laca pro sort'
Per tro impeta pen'
Fuĝas al mort'

2. Levu ŝin do kun zorg'
Per pia man'
Ho la gracila korp'
Preskaŭ infan'

3. Ĉu estas vera fam'
Ke la kristana am'
Estu nur ŝajn'
Ĉu sur mil stratoj ne
Staras kompat' ho ve !
Nek hejmn' ia ajn ?

4. Nek fenestroj de varma lum'
Nek la homara zum'
Nur nigra ond'
Havas allogon nun
Lun ajn lokon nun
Ekster ĉi mond'

5. Ne ribelulino nek
Laŭ tiu fina pek'
Taksu ni ŝin
Restas eraroj ne,
Restas misfaroj ne,
Jen nur virin'

6. Unu denove jen
Laca pro sort'
Per tro impeta pen'
Fuĝis al mort'

7. Levu ŝin do kun zorg'
Per pia man'
Ho la gracila korp'
Preskaŭ infan'.

La ŝtonaĵojn, kiuj oni uzis por konstrui la unuan Waterloo Ponto oni elfosis el kampo sude de la rivero. Oni tiris la materialon laŭ tramvojo, ne per lokomotivo, sed per ĉevalo.

Samuel Smiles en sia « Lives of Engineers » (Vivoj de la Inĝenieroj) rakontas, ke preskaŭ la tutan materialon tiris unu sola ĉevalo. Tiu ĉevalo « Old Jack » (La maljuna Joĉjo) estigis tre amata de la laboristoj. Ĝia kondukanto, Tomĉjo, estis bravulo. Tamen, plaĉis al li trinki glaseton de io antaŭ matenmanĝo. Bonŝance, proksime de la fervojo, inter

la ŝtonejo kaj la ponto troviĝis trinkejo. Kaj, ĉe ties pordo, Tomĉjo kutimis haltigi Joĉjon, malsupreniri de sur la tramveturilo, kaj eniri la trinkejon por trovi sian glaseton. Nu, foje, Tomĉjo restis en la trinkejo iom pli longtempe ol kutime. Joĉjo senpacienĉiĝis. Do, ĝi enmetis la kapon laŭ la pordo de la trinkejo kaj prenis inter siaj dentoj la kolumon de Tomĉjo (Smiles aldonas, ke ĝi faris tion tre delikate). Kaj tiel la fidela ĉevalo fortiris sian mastron for el la trinkejo, inter liajn kunulojn por daŭrigi sian laboron.

J.-G. FOWLER.

(Omāge al la memoro de la glora hispana poeto
en la 30-a datreveno de lia morto.)

PLORKANTO POR LA TOREADORO
IGNACIO SANCHEZ MEJIAS

POEMO ORIGINALA DE :
FEDERICO GARCIA LORCA
(1898-1936)

LA SANGO ELVERŜITA

Ne ! Mi ne volas rigardi !

Voku la lunon al mi !
De Ignac' la ŝprucan sangon
mi ne volas plu rigardi
en flak' sur l'arena flavo.

Ne ! Mi ne volas rigardi !

Sur la ĉiel' plena luno ,
kvietaj la nubĉevaloj,
l' areno griza, dormema,
kun salikoj ĉe la baroj.
Ne ! Mi ne volas rigardi !
de Ignac' la ŝprucan sangon,
ĉar poste brulos en mi
la terura memoraĵo.
Alvoku l'etajn jasmenojn
kun ties blankaj petaloj.

Ne ! Mi ne volas rigardi !

La bovin' de l'olda mondo
lekas per malgaja lango
muzelon ruĝmakulitan
de l' pluraj verŝitaj sangoj,
dum — duonŝton', duonmorta —
la virbovoj de Gisando
muĝas kiel du jarcentoj
lacaĵ de l'tera tretado.

Ne ! Mi ne volas rigardi !

Kun la morto sur la ŝultroj
alproksimiĝas Ignaco ;
kun la morto sur la ŝultroj
li suriras la ŝtuparon.
Li serĉis vanan tagiĝon
sed li ne trovas la tagon ;
li revis certan profilon
sed la rev' estis trompaĵo ;
li serĉis belan sintonon
kaj nur trovis ŝprucan sangon.

Ne ! Mi ne volas rigardi !

Ne ! Mi ne volas rigardi
la etigantajn ŝprucaĵojn
nek la flakon lumigantan
la cirkan benkoŝtuparon
en fal' sur felojn kaj felojn
de l'soifa homamaso.
Ve ! Kiu petis de mi
ke mi rigardu la sangon ?

Ne ! Mi ne volas rigardi !



Li la okulojn ne fermis
antaŭ la korna minaco,
sed la bovinaj patrinoj
levis terure la kapojn.
Kaj tie, ĉe l' taŭbredejoj,
sonis misteraj kriadoj
per kiuj l' taŭrojn ĉielajn
vokis nebulaj submastroj.

Neniam princ' en Sevilo
faris al li konkuradon,
nek koroj al lia koro,
nek spadaĵo al lia spadaĵo.
Kvazaŭ leona rivero
el li fluegis l' elano,
kaj estis marmora torso
lia saĝa toreado.
Aer' de Rom' andaluza
origis al li la kapon,
kaj estis lia rideto
lerta kaj gracia nardo.
Toreador' en la cirko !
En la montar' montarano !
Tenera ĉe l'matenroso !
Miriga ĉe l'festaj tagoj !
Milda koro por la spikoj
kaj dura per la spronradoj !
Kaj ĉiam granda kun la
lasta banderila paro !

Sed li jam dormas por ĉiam !
La muskroj kaj la herbajoj
malfermas per saĝaj fingroj
la floron de lia kapo.

Kaj tra kampoj kaj marĉoj kaj herbejoj
venas al ni, kantante, lia sango,
kiu glitas sur kornoj frostigitaj
kaj stumblas sub la taŭraj hufostamfoj,
senanima, dubema tra l' nebulo,
kiel longa, malhela, trista lango,
por, fine, sterni flakon agonian
de la Ĝuadalkivir' sub la stelaro.

Ho, hispana blanka muro !
Ho, nigra malgaja taŭro !
Najtingal' de liaj vejnoj !
Ignaca malmola sango !

Ne !
Mi ne volas rigardi !

Ne estas kaliko, ne !, por ĝin enteni,
nek por ĝin trinki venos hirundaro,
nek por ĝin malvarmigi falos prujno,
nek ŝuto de lilioj, nek gaĵkantoj,
nek diamanta pluvo por ĝin ŝirmi
en argenta tegado de kristaloj.

Ne ! Mi ne volas vidi !
Mi ne volas rigardi lian sangon !

Esperantigis : Alvaro De Orriols.

(Nura traduko rajtigita).

La Lando de Reĝino Maud (3)

Novelo de Zorja Danovskaja

Venis somero. Foje tagmeze la suno faligis pluvegon da blindigaj radioj sur la homojn, sur la maŝinojn, sur frakasitan teron. La maldekstra deklivo de la fosego malrapide ekkrampis suben. Tie laboris homoj. Zinjo hastis en laŭvoja « Willys », la doktoro venis ĉirkaŭ du horojn poste. Dum kelkaj horoj oni helpis elfosi la kamaradojn. Neniu mortis, sed Zinjo kaj la doktoro ne dormis; la doktoro mem faris bandaĝojn, fiksis la bastojn. Al unu, grave vundita, estis necesa urĝa operacio — la doktoro faris ĝin tuj en la kampo. Zinjo helpis lin preskaŭ falante pro laco. Nur kiam ĉiuj suferintoj estis feliĉe ekspeditaj en hospitalon, ŝi povis ripozi kaj restis tranokti ĉe sektorejo en la tendo de l'laborestro. Iu zorgeme kovris ŝin per stabita vata jako.

Zinjo estis dekorita per ordeno. Ŝi ne sentis sin heroino: nenion ŝi faris eksterordinaran. Ŝi alpinglis la ordenon al la nova bluzo el krepjorĵeto — la materialo diafana kaj facila kun intensa, ĝojspruca desegno, kiu plenigis ĉiujn butikojn de la konstruloko — kaj sur la flora desegno la ordeno ŝajnis esti granda floro. Oni multe aplaudis al ŝi. Ŝi nenion povis diri. Ŝia portreto aperis en la gazeto. Kaj jen ĉio. Sed la doktoro, la sama, kun kiu ŝi laboris dum la elfosado, komencis skribi al ŝi leterojn. Li skribis longe kaj inspire, rakontis pri si, pri sia laboro. Li estis bona junulo kaj multon vidis. Unu fojon semajne Zinjo ricevis koverton, en kiu nepre estis du folioj de papero, plenigitaj per etlitera densa skribo. Li skribis al ŝi pri tralegitaj libroj, pri viditaj kinofilmoj, pri homoj, pri vivo...

Sed Zinjo ne povis respondi al la leteroj. Tio ja ne estis leteroj de Andreo. Al li ŝi respondus. Same longe ŝi skribus pri la homoj, pri la vivo... La lando de reĝino Maud — kiel malproksime estis la tempo! Andreo pensis, ke ŝi fantazias, ke ŝi estas revulino; li eĉ ne volis ligi kun ŝi sian vivon. Ion ŝi ne komprenis tiam, ion grandan kaj

tre gravan. Nun ŝi komprenus tion. Nun ŝi mem partoprenis en la granda vera vivo. Ne elpensitaj, sed realaj estas la herooj ĉi tie, kaj ili akceptis ŝin, kiel la egalulon; ili alte taksis ŝian etan, sed tiom fortan koron, ili donis al ŝi parton de sia gloro...

La stepo silentis. La noktoj estis longaj kaj senlumaj. Enpremite la vizaĝon en flatan malmolan kusenon (mankis tempo por frape pufigi ĝin), Zinjo malĝojis pri la feliĉo, kiu ne plu estos. Sed tage ŝi forgesis pri tio, tage mankis tempo por pensoj pri si mem. Kiam matene en malmola kuvo de la renversebla kamiono, kovrita per pecoj de alsekiginta argilo, ŝi veturis al la sektorcentro, ŝi subite eksentis sin parto de la arda seka stepo kaj de fora ĝishorizonta vastito.

Ŝi revenis en la gepatran urbon ĉe tagiĝo. Stacidome ŝi prenis taksion. Hejme ĉio estis, kiel antaŭe. Same klopodis la patrino, kaj sur la muro pendis granda mapo. La pupoj de Zinjo sidis sur la kanapo en severa, dum jaroj konstituita ordo. Ĉio, ĉio estis sama, nur Zinjo estis alia.

Vidinte la ordenon, la patrino svingis la manojn. Nenion similaŭ skribis pri si la filino. Alvenis najbarinoj, la patrino de Andreo.

Ili demandis ŝin: « Kien do nun, Zinjo kara? ».

Kien nun? Ŝi ankoraŭ ne sciis. La konstruo estas finita. Zinjo estas libera elekti mem sian lokon en la vivo. Por ke estu same bone! Por fari ion grandan, necesan... Ŝi iris al la distrikta komitato de Junkomunista Ligo.

Kaj tiel okazis, ke frumatene Zinjo supreniris ŝtuparon de motorŝipo foriranta al Antarktiko. Do, tamen ekzistas la lando, nomita laŭ nomo de iu reĝino, la lando, kiu

logis al si Zinjon dum tuta ŝia vivo. Longa kaj malfacila estas la vojo al ĝi. Sed tio jam ne gravas.

Andreo ekvidis Zinjon frumatene. Ŝi staris, sin apogante kontraŭ la barilo kaj enpense rigardis grizan foron. Malgrasa, eta tute knabina. Andreo komence eĉ ne kredis, ke tio estas Zinjo.

Li rememoris la amaran tagon kaj komprenis, ke li ne devis tiam foriri. Pri ĉio li kulpigis sin. Li skribis al ŝi, longajn leterojn, sed neniun forsendis. Sen Zinjo io mankis en la vivo, io tre granda...

« Zinaida Nikolajevna, oni petas via », alparolis Zinjon iu junulino.

« Mi iras » respondis Zinjo.

Kaj ŝi preteriris Andreon tute apude, jam aĝa, serioza kun meditema rigardo de la grizaj okuloj, ŝi ne rimarkis lin.

Malfrue vespere Andreo frapis ĉe la pordo de la kajuto de Zinjo. Knabino, kun kiu loĝis Zinjo, estis deŝoranta, kaj Zinjo solis.

« Saluton, Andreĉjo » diris Zinjo. Ŝi salte levigis de la lito, kie ŝi kuŝis kun libro. Kaj Andreo ĝene staris en la pordo.

« Sidigu » diris Zinjo. Ŝi ne eldiris miron. Tiel devis esti. Nun la tuta mondo, ĝis la plej malproksima, kaŝita en la neĝoj, lando de reĝino Maud, apartenis al ŝi, kaj ŝi devis venki.

« Jen neniam mi pensus, ke vi kapablas iri al Antarktiko » ne sen malico diris Zinjo. « Tio ja estas romantiko, fantazio, deliro ».

Nun estis ŝia tago, kaj ŝi volis iomete turmenti Andreon. Sed li rigardis ŝin kaj ne povis rekonii ŝian voĉon nek ŝian manieron de sinteno al li, kvazaŭ al infano..

« Mi iras, ĉar min sendas la Patrujo », diris Andreo, « Neniu romantiko, neniu fantazio. Mi, verdire, neniam pensis, ke vi estas kapabla ŝipi al Antarktiko. Mi pensis, ke vi povas vojaĝi nur sidante hejme sur kanapo. Mi estas fiero pro vi, Zina ».

Ili eksilentis. Ili ne havis, kion diri pli. Andreo, ruĝa pro konfuziĝo, sidis sur ŝegrando kaj frotis la kaskedon. Zinjo ne sciis, kion fari. Kaj ŝi komencis rakonti. La vortoj fluis facile. Ŝi rakontis pri stepaj ŝipoj, pri peza, akvoplena argilo disrampa sub la piedoj dum pluvoj, pri knabinoj, forveturintaj al la konstruo, pri novaj ŝoseoj, pri la granda kanalo. Ŝi metis sur la tablon siajn delikatajn fingrojn kun hardita haŭto, kaj Andreo volis kisi la fingrojn.

Ĉu oni povas kompreni, pro kio oni amas iun? Zinjo rigardis Andreon kaj pensis: « Pro kio mi amas lin? Mi ne scias. Neniam mi sciis. Ĉiam mi amos, batalos. Verŝajne, mi estas forta ».


« Eble, oni povas ankoraŭ revenigiti? », pensis Andreo, atentante sonojn de ŝia voĉo.

Kaj Zinjo subite eksilentis. Ŝi rememoris sian doloron, sian solecan, ĉiaman doloron. Sed Andreo sidis apude, kaj ne estis loko por ofendo en ŝia koro.

Venis post la deĵoro la najbarino de Zinjo. Andreo foriris el la kajuto. Li iris sur la supran ferdekon. Estis silente. Obtuze bruas la maŝinoj. Nigralake flagris la maro.




GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 85 jaroj naskiĝis en Malaga :

Pablo PICASSO. — La hispana Picasso, genia pentristo, modlisto, ceramikisto kaj desegnisto, nun vivas kaj laboras sur la Lazura Mabordo. Li estas samtempe la plej ŝatata kaj la plej kritikata artisto de nia epoko. Grandegajn sumojn li ricevas por siaj artaĵoj. Eĉ nun li daŭre serĉas novajn art-rimedojn por sin esprimi



Antaŭ 65 jaroj naskiĝis en Jefferson (Usono) :

George GALLUP. — Tiu usonano havis la ideon fari metodajn enketojn ĉe la publiko mem por koni la opinion de la plej divers-devenaj kaj mediaj homoj. Lia instituto laboras por la politikaj partioj, industrio, kaj ĉiuj interesataj grupoj. La rezultoj de la enketoj estas ofte tre proksimaj de realeco. Similaj institutoj nun ekzistas en Eŭropo.



Antaŭ 50 jaroj mortis en Aix-en-Provence :

Paul CEZANNE. — Nur kiam li mortis la okuloj de la kritikistoj saĝnis malfermiĝi kaj vidi lian grandan laboron. Li forlasis la etoson de Parizo, scenejo de la impresionistoj, por reveni al sia kvietaj Provenco, kiu daŭre estis la temo de lia arto. La pentroarto de Cezanne estas fakte ponto inter la klasika tradicio de la franca pentroarto kaj la moderna.

BRETONAN FANTAZIAJON ...

... rakontas **R. Martin**

Ĉiuj, kiuj atente rigardas la lunon, povas klare vidi, ke sur ĝi maljuna virino vivas, portante egan faskon de branĉoj sur siaj ŝultroj. Tio ne plu estas neita de la plej famaj scienculoj en la mondo, sed neniu el ili laŭte asertas tion, ĉar, kiel vi bone scias, la scienculoj estas plej parte viroj, kaj kiel vi ankaŭ bone scias, viroj estas sub la jugo de virinoj kaj virinoj ne ŝatas la lunon. Sekve, ili ne volas, ke viroj pritraktu tiun ĉi aferon.



Tamen, unu el miaj amikinoj, en Bretonio, nome maljuna Marianik Arcoz el Landerno kvazaŭ eklumigis la kandelon en mia kapo.

Iam, (mi ne plu memoras la precizan daton, bonvolu senkulpiĝi min) do, iam, kiam mi manĝis kelkajn de ŝi faritajn mirindajn krespojn, ŝi sopiris, eklevis la kapon ĉielen, rigardis la lunon, kiu argente brilegis kvazaŭ pura juvelo sur la nigra vualo de la nokta velbo kaj ŝi flustris la jenajn vortojn :

« La plej sperta krespfaristino en mia juneco estis iu virino kiu vivis sole, aparte, kun nigra hundaĉo sia en dometo starinta ne malproksime de la vilaĝa tombejo. Ŝi estis sperta sed tute ne bonkora. Ŝi kutime iris kun sia hundo tra la arbareto de Tan por faskigi pecojn de mortintaj branĉoj. Generale ŝi elektis lunbriligitajn noktojn, ĉar ŝi bezonis fari egan fajron frumatene por kuiri siajn krespojn ĝustatempe antaŭ la ĉiusemajna foiro. Dume, mi kiel servistino, venis al la dometo por prepari la paston. Mi ĉiam memoros la matenon, kiam mi alvenis kiel kutime, eniris la kuirejon kaj ekpreparis la paston. Metante lakton kaj akvon en duonplenan de faruno basenon, mi estis preparonta la paston, kiam la virina hundaĉo eniris sole, ĝemante bojis, kvazaŭ plorante kaj dezirante, ke mi foriru. Mi, timante ion malfeliĉan, kurante eliris, sekvis la hundon ĝis la arbareto kaj vane serĉis la krespfaristinon. Nenie mi povis trovi ŝin eĉ per la helpo de la hundo, kiu daŭre ĝemis ».

Subite, la hundo sidigis kaj eklevante la kapon ĉielen, li ekbojis al la luno. Terure ! Rigardante ĝin, mi vidis, ke ĝi ne plu similas al ordinara luno. Ĝi estis sangokolora kaj same kiel nun, mi povis vidi la silueton de mia mastrino, portante ankaŭ silueton de fasko ! Mi freneze revenis al la vilaĝo kaj rakontis ĉion al la gevilaganoj, kiuj mire rigardis la novan vizaĝon de la luno. Ĵobik, la ĉasgardisto klarigis ĉion : preterpasante la tombejon li vidis iun

virinon, — mian mastrinon — kiu, antaŭ iu tombo malfermita de ŝi, prenis juvelojn kaj diversajn trezorojn kutime enmetitajn apud la mortintoj. Subite, fulmo rapidis, venante, laŭ liaj diroj, el la luno, kirle prenis la rabistinon kaj transportis ŝin tra la aero, tra la malplenaj malvarmaj spacoj ĝis la luno mem.

« Ne sufiĉas esti sperta krespfaristino », konkludis Marianik, « por meriti paradizon, ankaŭ necesas esti pli bona, almenaŭ ne malbona ».

Vi komprenas nun, kara leganto, kial la luno estas krespforma, kial sur la luno estas maljuna virino, kial hundoj ĝemante bojas al la lumigilo de la noktoj, kial virinoj ĝenerale timante rigardas la lunon kaj kial edzinoj ofte estas... « lunatikaj » !

TEATRAĴETO

(Hélène Chavan)

Patro kaj filo : 2 rolantoj.

La patro legas en fotelo ; lia filo preterpaŝas piedpinte.

Patro : He, Filo mia, ĉu vi eliras hodiaŭ vespere ? Kiel vi estas bela ! Ĉu vi havas rendevuon ?

Filo : Jes... Eble... Bonan vesperon.

Patro : Do... Bonan ŝancon ! Ho ! tre belan kravaton vi havas ; sed ... ĉu... ne estas... la mia ?

Filo : Jes... ĝi... havas tiel belan koloron !

Patro : Nu... sed vi surmetas... ankaŭ mian dimanĉan ĉemizon !

Filo : Jes, patro, la mia, estas... malpura...

Patro : Kaj vi enmane tenas... miajn gantojn !

Filo : Ho ! Paĉjo, mi tute ne perdos ilin...

Patro : Plie tiu zono estas ankaŭ la mia ! fripona filo, vi troigas.

Filo : Sed ĝi estas necesa por teni... vian pantalonon ! (kurante li foriras)

Patro : (li forte enspiras) Mia... parfumo... Ha ! tiuj junuloj, ĉiam aplombaj ... sed ... siatempe ... ankaŭ mi faris same... kiel... li, jes. jes... Estas tempo por iri al la esperanta kunveno. Mi demandas min ; ĉu mia friponeta filo ne prenis ankaŭ... mian mantelon ? (li eliras).

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Rezultoj de la konkurso 65-66 :

1. S-ino HUMM, Avignon ricevis	145	poentojn
2. S-ro GIMBERT, Lempdes	139	«
3. S-ino BENAZET, Argeles	138	«
4. S-ro TRIPIER, Taninges	137	«
5. F-ino ROBIN, Sceaux	133	«
6. S-ino VINCENT, Les Andelys	132	«
7. S-ro LIGOT, Valenciennes	129	«
8. S-ro SALASC, Béziers	121	«
9. S-ro CAPTEIN, Den Haag	108	«
10. S-ino LAURIE, Bournemouth	104	«

ktp...
F-ino CARRE ricevis 149 poentojn. Bedaŭrinde ŝi ne povis konkursi pro tio ke ŝi jam gajnis lastan jaron. Ni gratulas ŝin.

Nia konkurso 1966-67 :

Kiel ĉiujare komenciĝas en ĉi-tiu numero nia konkurso, kiu daŭros dum kvar numeroj de « Kulturaj Kajeroj ». Ni atentigas vin, ke nur abonintoj rajtas partopreni tiun konkurson. La konkursantoj bonvolu do kunsendi, almenaŭ unufoje, la banderon de la revuo kun siaj respondoj.

Ni petas vin sendi viajn respondojn antaŭ la fino de la monato sekvanta tiun de la aperigo de la revuo, do, por la ĉisubaj problemoj, antaŭ la fino de novembro.

En ĉiu numero, la konkurso konsistas el du problemoj. Nur tiujn du problemojn vi devas respondi, kaj tute ne la amuzajn problemojn, kiuj staras aparte de la konkurso. Sendu viajn respondojn al : S-ro P. CHEVALIER, 19, boulevard G. Lauriol, 44-Nantes (Francujo), kaj ne forgesu precizigi viajn nomojn (S-ro, S-ino, F-ino), kaj adresojn.

La du premioj konsistas el : 1) du-semajna restado en la Kulturdomo; 2) Unu-semajna restado en la Kulturdomo. Tiujn restadojn la gajnintoj povos ĝui en 1967 aŭ en 1968. La gajnintoj de la du antaŭaj konkursoj ne rajtas partopreni (fakte ili povas partopreni sed ne gajni denove).

UNUA PROBLEMO

En la ĉisuba teksto, bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj :

« Dum la daŭro de la historio, tio, ... agas, tio, ... estas, ne estas la logikaj abstraktaĵoj de la, sed la aspiroj pli malprecizaj de la agadaj homoj.

Kiu parolas ? Ĉu nescienculo, kiu, ... ia jaluzeco, malŝatas la scienculojn ? Ne ! sed unu la eminentaj de nia tempo, la franca filozof Boutroux ».

Aŭentu. — Estos kalkulitaj 2 poentoj por ĉiu taŭga vorto ; sed estos forprenita 1 poento por ĉiu malĝusta vorto.

DUA PROBLEMO

(20 poentoj)

Enigma. — (afable proponita de S-ino Guillot). Vi devas trovi frazon konsistantan el 38 literoj.

Tiu frazo estas utilega konsilo por ĉiuj. Tiujn 38 literojn vi trovos anstataŭigante la subajn seriojn de nombroj per vortoj, kies difinoj estas donitaj. Ĉiu vorto konsistas el tiom da literoj, kiom da nombroj.

19-31-11-7-8-19-16-31-15-2 : amata birdo

2-17-14-27-9-2 : frukto

20-38-15-21-37-38 : Malagrabla sento

35-28-18-13-14-19-4-2 : kara juvelo

22-2-33-36-27-4-18-17-28-2 : klarigo

16-38-17-9-21 : parto de la korpo

20-34-13-31-29-2 : Bedaŭrindaĵo

33-5-3-25-21-6-2 : parto de kapo

16-37-14-33-23-4-8-1-2 : lernilo

11-14-3-10-23-37-38 : nomo de monato

15-36-1-18-27-7-2 : bela floro

24-30-16-32-31-19-35-38 : malmolŝela frukto

22-23-17-25-2 : ludilo

16-5-6-12-37-14-32-38 : altranga oficiro

AMUZAJ PROBLEMOJ

(apartaj de la konkurso)

Solvoj de la antaŭaj problemoj :

Kurioza maniero vojaĝi. — Estu « x » la distanco AC. Car la du personoj foriras de A samtempe kaj alvenas en B ankaŭ samtempe ili vojaĝas dum samdaŭra tempo :

$$\begin{aligned} \text{unu persona} &: \frac{x}{15} + \frac{20-x}{5} \\ \text{dua persona} &: \frac{x}{20} + \frac{12}{4} \\ \text{Ni povas skribi} &: \frac{x}{15} + \frac{20-x}{5} = \frac{x}{20} + \frac{12}{4} \\ \text{Do} &: \frac{60-2x}{15} = \frac{2x+12}{4} \\ (60-2x) \times 4 &= (2x+12) \times 5 \\ 240-8x &= 10x+60 \\ 140 &= 18x \\ x &= 7,777 \end{aligned}$$

respondo : AC = 7,777 km.

La ruza simieto. — La kokoso falos sur la kapon de la pli altstatura sinjoro.

Aliaj problemoj (proponitaj de S-ro Jarlier) :

La rompita bambuo. — Bambuo 10 futojn alta, estas rompita je ia distanco de la grundo. La supra parto pendas tiamaniere, ke ĝia pinto tuŝas la grondon je distanco de 3 futoj de la bazo. Je kiun distanco de la grundo la bambuo estis rompita ?

La faskoj de asparagoj. — Restoraciestro aĉetis kvanton da asparagoj, kiun ĉirkaŭas ŝnureto unu futojn longa. La morgaŭon li deziras aĉeti duoblan kvanton da asparagoj. Li prenas ŝnureton duoble longan kaj volas pagi nur duoblan prezon. Ĉu li pravas ?

GRAMATIKO PER BONHUMORO

Preter. — Prepozicio montranta lokon aŭ objekton, kiun io laŭiras kaj poste forlasas, pasante pli antaŭen.

Prefikso signifanta, ke oni lasas flanke iun lokon aŭ objekton irante pluen, aŭ malzorgante iun aferon, pro malatento aŭ malŝato.

(Plena Vortaro).



— Ne, mi ne povas preterlasi la okazon !



— Donu al mi tiun vinon, kiu ebligas mian edzon ne pretervidi m'n !



— Ne, ne ! Mi ne preteratentas viajn argumentojn, sed... ĉu vi povus denove telefoni post la televid-programo ?

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (10 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczy, Nabrezie Metoda 1707/16, PŘEDVIDZA (1,50 us. dol.).
Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (10 kr.).
Finnlando : S-ino Kerttu Väättänen, Mäntyläntie 4, LAPPEENRANTA 5 (6,2 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, la, BARCELONO (77 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zł.).
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).
Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 resp.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo